

Pri la enketo de Marinko Gjivoje

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 561/88-2, 1982 februaro 25 kaj 27.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-88/SRI-1982-88-2-561-Claude-kaj-Andree-GACOND-Pri-la-enketo-de-Marinko-Gjivoje.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ekde 1980 la esperantistoj fine posedas tre kompletan konsultlibron pri la esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj. Tiu kvindek kvinpaĝa raporto de Marinko Gjivoje estas la rezulto de vasta kaj plurjara enketo.

A.- La libro komenciĝas kun resumoj en ses lingvoj. La franclingva fariĝas preskaŭ nelegebla pro la svarmo de preseraroj, bedaŭrinda karakterizaĵo de la tuta libro.

Cl.- La antaŭparolo komprenigas, ke tiu ĉi raporto inkludas bibliotekojn havantajn ne sole esperantan literaturon, sed ankaŭ interlingvistikan. Ĉar Marinko Gjivoje konstatas la fakton nerefuteblan, ke la neesperanta planlingva literaturo nuntempe okupas nur ĉirkaŭ 5 procentojn en tuta planlingva literaturo.

A.- Marinko Gjivoje poste prave asertas, ke "unuafaje en la historio de esperanto aperas verko en kiu oni trovas superrigardon pri esperanto-kolektoj en publikaj, asociaj, sociaj kaj privataj bibliotekoj," kaj ke same estas "pri esperanto-muzeoj, havantaj ankaŭ riĉan kolekton de esperanta literaturo."

Cl.- Pri la geografia lokiĝo de tiuj esperanto-bibliotekoj li skribas: "se la uzantoj signus sur la mondmapo per steletoj la lokojn en kiuj troviĝas kolektoj de esperanto-literaturo, montriĝus ke la reto de bibliotekoj estus relative densa grandparte en la eŭropa kontinento, maldensa en la ceteraj, kaj entute neekzistanta ekzemple en Afriko kaj grandaj spacoj de aliaj kontinentoj, precipe Azio."

A.- Fine, ĉiam en tiu antaŭparolo, Marinko Gjivoje konstatas, ke nur en kelkaj publikaj bibliotekoj kiel tiuj de la katolika Universitato en Lublin (Pollando), de la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds, Svislando, kaj de la Stedelijke Openbarebibliotheek en Kortrijk (Belgio) la libroj kaj gazetoj en esperanto estas apartigitaj de la nacilingva materialo. En la aliaj bibliotekoj oni povas trovi en laŭtema katalogo nur lernolibrojn, vortarojn kaj informilojn pri esperanto. La verkoj beletraj, teknikaj, sciencaj, politikaj kaj la aliaj libroj en esperanto troviĝas dise en la ĝenerala alfabeta katalogo laŭaŭtoro. Por ilin malkovri oni devas trafoliumi milojn da slipoj, kio ne estas konvena por serĉantoj.

Cl.- Sekvas ĉapitroj, kiuj interesas antaŭ ĉio la fakulojn. Ili pritraktas la taskojn de la bibliotekoj kaj havas bibliografian celon. Ili alportas tre utilajn informojn, kiuj faciligos la laboron de la bibliotekistoj.

A.- La ĉapitro raportanta pri la historio de la unuaj esperantaj bibliotekoj kontraŭe povas interesi vastan publikon. Tial ni hodiaŭ abunde citos el ĝi.

Cl.- Sed unue ni ankaŭ menciu, ke la raporto de Marinko Gjivoje poste listigas la tridek plej grandajn esperanto-bibliotekojn en la mondo kaj alportas kiel eble plej da informoj pri iliaj kolektoj, labormetodoj kaj konsultebloj. Tiu ĉi parto denove estas utilega, kaj por la bibliotekistoj, kaj por la serĉantoj. Ĝi favoras la interbibliotekajn kontaktojn.

A.- Jen kion Marinko Gjivoje skribas pri la historio de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, kiu tutcerte estas la plej riĉa esperanto-dokumentejo. Ni citas :

Cl.- Mankis institucio kun internacia karaktero, en kiu estus kolektita ĉio kreita en esperanto kaj pere de ĝi. Tial, dum la 19-a Universala Kongreso en Danzig (1927), Felix Zamenhof, la frato de Ludoviko, faris la proponon establi ie en la mondo internacian esperanto-bibliotekon. Unu el la ĉeestintoj, la aŭstra fervojisto Hugo Steiner (kiu naskiĝis en 1878 kaj mortis en 1979) decidis rezigni sian profesion kaj plene dediĉi sin al la realigo de tiu ideo.

A.- Li ricevis apogon de la aŭstria kanceliero Ignaz Sepel, tiel ke en aprilo 1928 oni diaponigis al li provizoran laborlokon en iama ĉevalejo, kun malgranda tablo, du seĝoj kaj forneto.

Cl.- Tiu ejo baldaŭ montriĝis tro malgranda, ĉar Hugo Steiner komence celis kolekti kaj konservi la tutan materialon pri esperanto kaj pri la dumjarcentaj klopodoj solvi la lingvan problemon. Li komprenis, ke li plene solvos la problemon nur instalante la muzeon sub la ŝtata administrado, kio prezentus sekurecon por ĝia daŭra ekzistado kaj evoluado.

A.- Post intertraktadoj kun la ĝenerala direktoro de Aŭstria nacia biblioteko en Vieno, Hugo Steiner sukcesis atingi konvenan kontrakton en septembro 1928, per kiu la muzeo estis alligita al la Biblioteko por "eterna tempo" kiel speciala fako. La ŝtato devigis sin senpage disponigi la necesajn ejojn, pagi la bindigon de la volumoj kaj havigi la rimedojn por laŭorda administrado.

Cl.- Fine de 1928 la Federacia Prezidento de Aŭstrio, Wilhelm Miklas transprenis la protektadon de la Muzeo, kaj la 1-an de aŭgusto 1929 okazis la solena inaŭguro de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, en ĉeesto de pluraj eminentuloj kaj de pli ol sescent esperantistoj.

A.- En 1930 la Muzeo translokiĝis en salonegon de la Nova Imperiestra Kastelo, kaj du jarojn poste ĝi ricevis plian grandan salanon.

Cl.- La fondo de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno kaj la posta multjara laboro alportis al Hugo Steiner la titolon "Kortega Konsilisto".

A.- Lia helpanto estis Gustav Weber, kiu pro sia aktivado por esperanto estis arestita de la naziaj okupantoj en 1938 kaj mortis sekve de kruela traktado en koncentrejo en aprilo 1945.

Cl.- Kiam Hitler aneksis Aŭstrion, la Muzeo estis fermita kaj ĝia direktoro enkarcerigita. La materialon oni tamen povis savi, ĉar ĝi estis ĝustatempe deponita en la kastela kelo.

A.- Tuj post la liberiĝo, en 1945, la Muzeo ricevis novan hejmon en la kastelo : kvin salonegojn.

Cl.- Ekde oktobro 1949 la Muzeo ricevas ĉiujaran subvencion de la Ministerio pri Edukado.

A.- En 1950 ekaperis, kvarfoje jare la bibliografie utila Informilo de IEMW, kaj komence de junio 1991 okazis inaŭguro de "Panteono" por la pioniroj de la mondlingva ideo.

Cl.- Nuntempe deĵoras en la Muzeo du profesiaj bibliotekistoj, d-ro Walter Hube kaj s-ro Herbert März. Vizito eblas lunde, merkrede kaj vendrede de la 9-a ĝis la 15-a horoj. La biblioteko eldonis du dekumajn kaj du alfabetajn katalogojn. Pri la tuta materialo ekzistas

sliparkatalogo. Ĝi konsultikas la kolekton, kiu konsistas el 18.000 libroj, 3.000 kazetoj, 700 aŭtografoj, 400 muzikaĵoj 30.000 informiloj kaj amaso da aliaj esperantaĵoj : gazeteltranĉaĵoj, afiŝoj, vinjetoj, ktp. Bela rezulto, kiu honoras la memoron de la pioniroj Hugo Steiner kaj Gustav Weber.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2014*